

JEN



Aminda samideano.—Oni anoncis al mi postkongresan karavanon.

LA FIRMO

HACHETTE KAJ Kio

79, Boulevard Saint - Germain

Paris

DECIDIS KLARIGI ĈIUN MISTERON.
TIAL POST LA *MISTERO DE DO-*
LORO DE A. GUAL, TRADUKITA
:: DE FRED. PUJULÁ, ĜI ELDÓNIS ::

Mistero de Amo'n

de Sinjorino N. Kolowrat

Kiun oni povas havigi al si per 1'25 frankoj

Sagaj esperantistoj ne devas legi

FRENEZO'n

DE FRED. PUJULÁ

SED ĈIU RAJTAŝ ĜIN AĈETI PER 1 FRANKO
ĈE HACHETTE MEM KAJ KORESPONDANTOJ

UEN



—Ĉu vi ne hontas? Alporti al mi muŝojn kun la brasiko!!

—Sinjoro, por unu spesmito, ni ja ne povas servi perdrikon, al la klientaro!

La papago de Claramunt

Multaj personoj ne scias, ke ne ĉiu komitatano de la Loka Komitato de la 5^a Kongreso ne estas kataluna. Sinjoro Claramunt, la silentema sinjoro Claramunt, naskiĝis tre malproksime de la lando de la ruĝaj ĉapoj kaj de la fritita kun ajlo moruo. Li vidis unuafojon la lumon en la milda Sud-Ameriko, en la Arĝenta Respubliko. La Loka Komitato de la 5^a estas, do, iom internacia, kaj ĝi elektis sinjoron Claramunt, kiel Pre-

zidanton de la Fako-Loĝado, atentinte la sperton, kiun li akiris, kiam reveninte de Ameriko, li mem devis zorgi por havigi al si loĝejon.

La alveno de sinjoro Claramunt al Barcelono estas memorinda. Li elŝipiĝis kun panama ĉapelo sur la kapo, poŝhorloĝa kunora ĉeno sur la ventro, unu branĉo de bananoj en la dekstra mano, kaj unu kaĝo kun papago en la dekstra. Ĉu ni devas diri, ke la rubando de lia ĉapelo estis verda, ke la papago estis verda, ke la stelo, kiun li surportis sur la brusto estis verda, kaj ke tiu verdeco estis la videbla pruvo de la esperantamo

*you
pans*



—Belega knabino!

—Jes; ŝi havas doton da miljono.



—Kiel vi juĝas la Katalunan ĉampanvinon ?
—Tute, kiel la germanan bieron de l' Paragvaĵo.

de sinjoro Claramunt? Jes; sinjoro Claramunt estas fervora esperantisto; kaj li ĝin pruvas ne nur per signoj, sed ankaŭ per parolo.

«Bedaŭrinde—li klarigis al la amikoj, kiuj iris akcepti lin ĉe la haveno—, bedaŭrinde, mi ne tro ŝatas parolon, bruon, krion. Sen tio ĉi, mi plenigus la mondon per miaj laŭtaj laŭdoj al nia lingvo. Sed ĉio estas arangebla, kaj mi provizis min per sekretario anstataŭanto. Vidu!»

«Tiu ĉi, ĉirinte, li signalis al papago, kaj la ornama birdo, rulante la R, raŭkis per plej fundamenta zamenhofa lingvo, aron da krioj, kiujn ĉiu amiko de sinjoro Claramunt ĥoris unuanime.

—«Vivu Esperanto!—Vivu Zamenhof!—Ni fosu nian sulkon!—Ĉiam antaŭen!

—«Vivu! Fosu! Antaŭen!»—respondis ni.


Kaj en la boato, de la ŝipo al la kajo, sinjoro Claramunt kontraŭkutime priakontis:

«Tiu ĉi birdo propagandis Esperanton pli ol plej famaj eŭropaj pioniroj. Kiam ĝi mortos, mi pajlremburigos ĝin, kaj pagos unuaklasan enterigon en skatolon de la Centra-Oficejo.—Ĉu sinjoro Berthelot ne skribis pri ĝi de Rio-Janiejro? Kial! Ĉu sinjoro Backheuser ne parolis pri ĝi en sia fama parolado pri Brazilio? Ĉu sinjoro João Keating ne disvastigis tra Eŭropo la famon de mia papago? Kiel tio povas esti ebla? Ĉu la belega libro de la Brazilia Ekspozicio ne raportas pri la papaga gento per miraj frazoj?—Puninda forgeso!! Sciu, sciu, ke mia papago ne estas simpla papago, sed vojaĝema papago, pli lerta ol la kolomboj, kiuj kvazaŭmutuloj, nur scias kunporti leterojn. Ĝi alportas sciigojn parolajn, kaj ĝi iras kaj revenas laŭ mia volo, kien mi deziras. Tial mi povis esperantigi ĉiun arbaron de l'Sud-Ameriko. Vespere, mi diradis al la papago:» Iru al arbaro, kaj revenu morgaŭ matene»; kaj li iradis kaj revenadis. Li profitatis tie la noktojn. «Vivu Espe-




MALSANO KAJ KONGRESO.

—Mi devos atendi la venontan Kongreson por edziĝi!



—Paĉjo, kial li tiel longe rigardas la pentraĵon?—
—Pat! Silentu! Certe li estas la aŭtoro!

ĈE LA KAJO DE L'KARBO



Ne ĉio estas esperkolora en la mondo.

ranto!—Vivu Zamenhof!—Ni fosu nian sulkon! Ĉiam antaŭen! ĝi kriadis. Ĉu vi komprenas?... Nun ĉiu papago de Ameriko lernis tiujn kriojn, kaj ĝis la fino de l'mondo ili estos aŭdeblaj de la homoj...»

Post tiu longa parolado, sinjoro Claramunt silentis, promesinte ne paroli plu nek pli.

Kaj ni ĉiuj adiaŭis lin, pensante pri, kiom da petroselo bezonus la reformistoj por veneni ĉiun papagon de la amerikaj arbaroj! (1)

(1) Ni scias per lastaj sciigoj, ke sinjoro Sabadell, kun permeso de sinjoro Claramunt, posedas rulkliŝon el la voĉo de la papago. (Noto de la Redakcio).



—Li fartas tre malbone; oni diras, ke baldaŭ oni faros al li nekropsion.

Franca Esperantisto


—Fine, ĉu vi povos diri al mi, ĉu sinjoro Rollet de l' Isle, la fama esperantisto aŭtoro de la Marista Terminaro, estas la fama aŭtoro de la franca himno «La Marseillaise» aŭ ĉu Sinjoro de Ménil estas la aŭtoro de tiu «Marseillaise» aŭ ĉu tiu ĉi estas parenco de la alia, aŭ, kio estas la kredindaĵo el ĉio ĉi tio?

—Mi pensas, ke Rouget de l' Isle, estas la aŭtoro de la himno Esperanto.



hafa qoo

—Kia malkuraĝulo! Ĝi ne decidigas! Se ĝi scias, ke mia Uĝejo devas pagi al mi kambion, kaj ne povas!...





—Kial tiel malgajaj? Ĉu vi venas de enterigo?
—Jes; mortiĝis al ni, la edzino de ĉi tiu.



PLENUMO DE PENTO

—Anstataŭ la tri partoj de rosario, kiun ordonis mia konfesrenanto, mi preĝos kvar, kaj mi trompos mian simplulon alian fojon.



—Ĉu vi vendis la pentraĵon?


—Preskaŭ.

—...?

—Jes; vendiĝis tiu, kiu estis alkröçita apud la mia.



—Ve al vi, edzino!... se vi ne apartenus al la malforta duono de la homaro!



—Kion! Vi tiel malĝojal!

—Oni skribis al mi, ke Marĝo min trompas.

—Sed vi ja sciis tion!

—Jes, sed nun mi ne plu povos sajnigi nesciecon!

Letero de franco al kataluno.

Parizo, Aŭgusto, 1909.

Al sinjoro Pau Baldruch,
Altestimata samideano: Mi nescias, ĉu tiu ĉi letero atingos vin; tamen mi skribas por plenumi mian devon de amiko, kiu devas montri scivolemon al la stato de la konatuloj.

Eble vi havas la kapon ĉe la piedoj, kaj male, kaj eble tiu ĉi letero nur taŭgos por ploriĝi vian edzinon kaj filinojn kaj sinjoron Puig, t. e. la tutan grupon, kiun vi tiel ageme fondis, kaj pro kio mi sendas al vi miajn plej korajn gratulojn.

Se vi legas tiun ĉi leteron, sciu ke la bapto de mia filino estis grava festo, pri kiu ĉiu ĉeestanto konservos agrablan memoron. Bedaŭrinde, via manko ĉagrenis min, sed amike mi devas diri al vi, ke vi estis tre feliĉa ne veninte, ĉar vi ŝparis al vi neagrablajn momentojn. Via lasta letero (publikigita en gazeto kataluna, dank'al sendiskreteco de iu redaktoro) kolerigis multajn personojn. Vi estu pli singardema alian fojon. Oni neniam devas malbone paroli pri la aliaj; pensu kion vi volos sed diru nenion krom laŭdoj. Jen estas la sekreto de la vivo. Mi bone scias kiel vi, ke Esperanto nur devas taŭgi por la komercaj rilatoj, kaj ke uzi ĝin por literaturaj verkoj estas sensencaĵo. Sed tion ni ne devas publike diri. Ne forgesu!

Jam de unu semajno, mia edzino pretigas mian valizon




—Kia varmo! Tiun ĉi someron, la varmo ŝajnas pli forta en Barcelono!

por vojaĝi al Barcelono. Mi acetis tri kostumojn el plej senpeza ŝtofo, dekduon da ventumiloj kaj blankan kaskon, ĉar oni diris al mi, ke en Barcelono ĉiu singardo kontraŭ la suno estas konsilinda. Mi jam sendis al la Komitato de la 5^a mian aliĝilon kun peto pri ĉambro kaj banejo. Oni certigis al mi ke la enlandanoj malmulte sin lavas, kaj ke ne ekzistas banejoj en la urbo. Sed mi vidis en la kataluna vortaro la vorton «bano» tradukitan, kaj tio pruvis al mi, ke vi almenaŭ konas la aferon. Ĉiukaze mi kunportos funton da sapo; mi ne dubas, ke almenaŭ sur la stratoj de Barcelono troviĝas fontanoj, kaj ke mi povos utiligi ilin.

Bonvolu saluti vian familion, kaj ne forgesu skribi al mi pri via sano. Mi ne havas adresojn de japano por doni al vi. Jam de longe mi nur korespondas kun hispanoj, ĉar mi faras kolekton de poŝtkartoj kun portretoj de toreadoroj. Ĉu vi ne povus sendi al mi kelkajn?



—Kiom da afekteco! Ja mi volus vidi ilin sub la batoj de mia edzino!



Trankviligu min tuj. Ĝis Septembro! Ĝis la Kongreso!!

Via tutkore.

M. Dupont.

Korespondado.

Sinjoro A. K.: Vi povas pagi vian abonon al nia gazeto per francaj anglaj aŭ germanaj poŝtmarkoj. Poŝtmarkojn ni akceptas volonte.—*Fino N.*, Estu trankvila. La nombro de niaj abonintoj estas tre granda, kaj la mono, por eldoni *Jen* dum unu jaro, estas deponita en Banko. La sola serioza afero ĉe *Jen* estas la administracio.—*Sinjoro Plej-kor*, Dankon pro via artikolo; ni preferus impresojn pri samideana vivado.—*Sinjoro Paculo*, Ne; ni scias, ke sinjorino K, tute ne koleris. Kial?! Ŝi estas tre inteligenta, kaj bone scias, ke mallaŭdo de malsaĝulo estas la plej bona laŭdo.

SEKRETARIO.

NE ABONU LA GAZETON

Unu jaro. 3 Fr. (1,200 sm.)
Jarduono. 2 » (0,800 sm.)

JEN

Plumdirektoro: Fred. Pujulà. Ĉ Krajondirektoro: Apa.


Eldonisto: RAMON FARRÉ. str. Portaferriça, 17, BARCELONO. (Li petas, oni faru la pagon per la «ĈEBANKO ESPERANTISTA» Merton Abbey. LONDON SW.)

REPREZENTANTOJ.

- G. Warnier, «Librairie de l'Esperanto» 15, rue Montmartre, Parizo.
- Möller & Borel, «Esperanto Verlag» 18/19, Lindenstr. BERLINO SW.
- Andr. Fred. Host & Son, Kg. L. Hofboghandel. Bredgade, 35, KJOBENHAVN.
- «The British Esperanto Association» Museum Station Buildings, 133-6, High Holborn, LONDON. WC.
- Libroeldonejo «Esperanto» — Valovaia, kv. 5.—MOSKA.

HUMORO DE L'AVOJ


Malnovaj karikaturoj el «Punch» de Londono



—Kion vi preferas, iri en liton, aŭ resti aŭskulti la historion de Anglujo?
—Iri en liton.



—Tri dentistoj? Mi returneniras. Ne facile, ke ili tri forestas.



—Panjo! Kial vi ne permesas al mi aŭdi «La Mascotte»?
—Tial ke ĝi estas malspritaĵo. Mi aŭdis ĝin, kaj mi certigas al vi, ke poste mi bedaŭris.
—Sed, kial vi ne permesas, ke mi bedaŭru ankaŭ?

FREMDA

JAPANUJO

Kawanabé-Kiosai estas moderna artisto de la mirinda Japanlando. Li mortis en 1899, kvindekjara, kaj lasis belegan verkon, indan daŭrigantaĵon de la arto de Hokusai, Utamaro, Hiroŝinge, k. c. Kiosai estis unu el la lastaj kulturantoj de la nacia humoro kaj precipe unu el la lastaj daŭrigantoj de la vera naciarto japana.

Li mortis ĝustatempe por ne infektigi de la arto de la modernaj eŭropanigitaj japanoj, kata kaj malica Georges Delaw.



HUMORO

KAWANABÉ-KIOSAI

kiuj—ho ironio!—bedaŭrite penas imiti la japanemajn germanojn kaj francojn, la Toulouse-Lautrecon kaj ceterajn.

Ni ne retorike dissekcos la humoron de tiu artisto, ĉar ŝajnas al ni pli praktika rekomendi al la atento de niaj legantoj, la zorgatan desegnadon de ĉiuj ĉi skeletoj, vivantaj, moviĝemaj, groteskaj, ridigaj kiel la personoj de lia preskaŭ antipodo la deli-





NE ABONU ANKAŬ

PAPITU'n

Kataluna satira karikatura gazeto.
Aperas ĉiusemajne.



ABONO:

Hispanlando: jarkvarono. 2 Ptoj.

Fremdlando: 3 .

PELAYO, 35 - BARCELONO

“ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL,,
LINDENSTR. 18/19. BERLIN. SW.

La “Esperanta Biblioteko Internacia,,

ELDONATA DE TIU FIRMO, ESTAS LA PLEJ MALKARA

0,10 SM. LA LIBRETO

LOKO LUEBLA

Neniu malbona esperantisto legas la

“FRANCA ESPERANTISTO,, 'n,

KIUN ONI ABONAS EN

46, BOULEVARD MAGENTA, PARIS



—Kia senfrukteco, patrino! Oni nur vidas radikojn!
—Kial vi plendas? Tio ĉi ja farus la feliĉon de gramatikisto!